奈良エスペラント会

会誌

# Kornumo

つのふり

N-ro 99

2022-01-17

作成：竹森

enhavo


１．学習会・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・2

２．次回学習会・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・2

３．今後の行事予定・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・2

４．その他・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・・3



奈良エスペラント会　奈良市西登美ケ丘 7 丁目 1-11 秋葉方

会費口座　ゆうちょ銀行　14580-11209501 ﾅﾗｴｽﾍﾟﾗﾝﾄｶｲ

奈良エスペラント会の皆さんこんにちは。La Movado が発送されましたので送付します。いつもの通り、会誌「Kornumo」と一緒に送付します。1/16 学習会に出席された方へは La Movado 直接手渡ししましたので会誌はメールで送付します。

## １．学習会

日時：1 月 16 日（日）１３：３０～
場所：西部公民館　５階　第三講座室
出席者：本田さん、中西さん、田中さん、竹森
２グループに分かれて学習しました。
・Ĉu vi parolas Esperante? 22 課を学習。
・ドリル式エスペラント入門 A37～A44 学習、完了。
　LaMovado 今月号の鶴の恩返しを読み合わせ。

## ２．次回学習会

**日時：2 月 13 日（日）１３：３０～**
**場所：西部公民館　５階　第三講座室**
・Ĉu vi parolas Esperante?　24 課から。
・ドリル式エスペラント入門、完了したので次の教材へ。
　鶴の恩返し読み終えたら、Gerda malaperis 等のやさしい読み物を行う予定です。

時節柄、体調には十分注意して無理をせず出席お願いします。コロナ対策も宜しくお願いします。

## ３．今年の行事予定

各地で開催される行事等の情報をまとめました。ご参考まで。太字が更新部分です。

| 開催日 | 行事名 | 場所 | 内容 |
|---|---|---|---|
| 2022 年<br>6/18(土)～6/19(日) | 第 70 回関西エスペラント大会 | 大阪市立中央会館<br>Osaka Metro 堺筋線・長堀鶴見緑地線「長堀橋」駅　徒歩 7 分<br>長堀橋を南へ約 200m、周防町通りを東へ曲がって約 100m<br>「島之内図書館」と同じ建物にあります。 | 日時・場所が決定。<br>主催：大阪エスペラント会<br>**中西史子さんのモンゴル琴ヤトガの演奏予定※** |
| 2022 年<br>9/23(金)～9/25(月) | 第 109 回日本エスペラント大会 | 八王子市学園都市センター（東京都） | |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 2022 年<br>8/6～-8/13 | 第 105 回世界エスペラント大会 | モントリオール（カナダ） | https://uea.org/kongresoj |

※6 月の関西大会、会場と日程が決まりました。Z 祭で好評でした中西史子さんのモンゴル琴ヤトガの演奏をお願いできないかという話が 1/15 の KLEG 委員会で出ました。中西とし子さんから問い合わせてもらい、快諾頂きました。Dankon！

## ３．その他

・大学入試共通テストが終わりました。傷害事件が発生したり、津波警報・注意報が発令されたりと異例な状況でした。受験生の皆さんは大変だったと思います。
・ La komuna ekzameno por eniri en universitaton finiĝis. Estis nekutima situacio, ke okazis vundo-afero kaj estis alarmita de la averto/atento kontraŭ cunamo. Mi pensas, ke tio estis eksterordinara por ĉiuj ekzamenitoj.

・北朝鮮からの度重なるミサイル発射、急増するオミクロン株のコロナウィルスの拡大、不安なことばかりです。
・ Kaj ripetaj misilo-lanĉoj el Nord-Koreio, kaj la rapida disvastigo de la omikrona varianto de la kronviruso estas tre tre maltrankvilaj.

・下記 URL より易しい読み物を選んでみました。
https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/reuzi-malnovajn-vestojn-r274/

**Reuzi malnovajn vestojn**

Kio estas via ŝatokupo? Por mi ĝi estas riparado de malnovaj vestoj.

Mi ŝatas kudri mane aŭ per kudromaŝino. Riparado estas ne nur ŝatokupo, sed pli signifa agado por mi. Ĉar mi pensas, ke el malnova afero mi kreas novaĵon; mi revivigas aĵojn jam mortajn, forĵetitajn de la homoj. Tiu agado kontribuas iomete eĉ por plibonigi la mondon.

Ĉu vi scias, kiom da vestoj estas forĵetitaj dum unu jaro en via lando? Kaj post la forĵetado, kien iras tiuj vestoj?

Ĉiujare ĉirkaŭ 100 miliardoj da vestoj estas produktitaj en la mondo, kaj 3,3 miliardoj el ili estas forĵetitaj. Gigantaj kvantoj da forĵetitaj vestoj alvenas en Akro, Ganao, kie estas la grandega bazaro "Kantamanto". Sed eĉ tie 40% de la importitaj vestoj el pluraj landoj ne estas venditaj en la bazaro, sed denove forĵetitaj sur la stratojn, kie ili finiĝas

apud la hejmoj de la loĝantoj. Aliaj estas ĵetitaj en la riveron. Tial amaso da vestorubaĵoj fluas sur la rivero kaj alvenas en la maron, kie ili endanĝerigas la vivon de la mar-estuloj. Krome kreiĝas monteto da forĵetitaĵoj, kie bovoj manĝas ilin kvazaŭ herbon. Tio estas nekredebla vero.

Ni facile aĉetas tro multajn novajn vestojn pro la malalta prezo, kaj ni rapide forĵetas ilin. Nuntempe la "rapida modo" estas grava socia problemo.

Por fari unu T-ĉemizon necesas 2700 litroj da akvo. Tio estas la kvanto kiun unu homo konsumas en tri jaroj. Kaj inter la tuta kvanto da varmiga gaso ellasata, 10% de la gasoj estas kaŭzataj de la mod-industrio. Tio signifas, ke ĝi ellasas pli grandan kvanton da varmigaj gasoj ol aviadiloj kaj kargo-ŝipoj.

Oni ankoraŭ ne konscias pri la gravaj problemoj kaŭzataj de "rapida modo" kaj la mod-industrio. Ĉar kutime oni ne vidas la problemon, same kiel oni ne vidas la problemon pri la multaj plastaĵoj.

Mi ŝatas aĉeti reuzeblajn vestojn en brokantejo, kaj foje mi ĝustigas ilin laŭ mia mezuro, aŭ ŝanĝas ilin al dezirata formo. Foje mi ankaŭ uzas la malnovajn vestojn de mia patrino, kiujn ŝi aĉetis antaŭ 30 aŭ 40 jaroj.

Kiam mi riparas malnovajn vestojn, al mi ŝajnas, ke tiuj vestoj komunikas al mi siajn rakontojn kaj la historiojn de la homoj, kiuj portis ilin. Tio estas plezura sperto por mi.

En la kronvirusa periodo, mi faris plurajn maskojn, reuzante malnovajn mantukojn, ne plu bezonatajn, ankoraŭ sufiĉe purajn, kaj mi donacis ilin al familianoj kaj konatoj. Ankaŭ tio estis plezura afero.

Espereble, per niaj ŝatokupoj ni faru ion por kontribui al pli bona mondo, laŭ nia eblo.

**LI Namsuk**


**LI Namsuk** estas korea esperantistino. Ŝi laboris profesie kiel socia aktivisto, en fako por helpi vunditajn kaj viktimigitajn virinojn, en kooperativo por ekologiaj produktaĵoj, en alternativa lernejo, kaj en organizaĵo por justa komerco. Nuntempe ŝi havas interesojn pri la situacio de nia terglobo. Kaj ankaŭ pri la Esperanto-movado, kompreneble!

- **bazaro:** granda kovrita aŭ sub-ĉiela vendejo, kie troviĝas multaj malpli grandaj vendejoj aŭ vendotabloj.




Foto: Commonswiki/Solipsist CC BY-SA 2.0

- **brokantejo:** vendejo, kie oni vendas jam uzitajn aĵojn.
- **giganta:** grandega, nenormale granda.
- **importi:** enporti komercajn produktojn en iun landon.
- **kargo:** la aĵoj portataj de unu loko al alia per ŝipo aŭ aviadilo.
- **konscii:** havi klaran scion pri la propraj agoj kaj spertoj.
- **konsumi:** uzi aŭ manĝi komercan produkton.
- **kron-viruso:** tre malgranda kaj nevidebla portanto de serioza malsano disvastiĝanta tra la tuta mondo ekde la jaro 2020.



- **litro:** difinita kvanto de akvo, lakto, biero aŭ simile.



- **mantuko:** tuko uzata por sekigi la manojn kaj vizaĝon post lavado.



- **masko:** vizaĝ-kovrilo.



- **miliardo:** mil milionoj.
- **modo:** nedaŭra kutimo, precipe rilate al vestoj, sed ankaŭ al aliaj aferoj, kiuj rapide ŝanĝiĝas.
- **ripari:** rebonigi rompitan aŭ nefunkciantan aferon.
- **rubaĵoj:** senvaloraj, nedezirataj restaĵoj por forĵetado.
- **ŝat-okupo:** neprofesia agado, kiun oni faras pro plezuro kaj intereso.